



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 2

FEBRUARO 2023 Kol. 453/39

XX

Enhavo : Festo de beata Odoriko; Gloria Artis; 100-a GEK;
Blogo de P. Netto; Eŭropa parlamento pri multlingvismo;
Ekskurso al Himalajo; E-kastelo Greziljono; Trista anonco.

XX

Festo de beata Odoriko, la 14-an de januaro 2023

Sabate, la 14-an de januaro, en areo de la preĝejo „Panny Marie Sněžné“ (Virgulino Maria la Neĝa) en Prago okazis festo de la datreveno de la morto de beata Odoriko de Pordenone.



Odoriko estis monako de la franciskana ordeno. Sojle de la 13-14-a jarcentoj, (cca 50 jarojn post Marco Polo), li pilgrimvojaĝis malproksimen, orienten. Li atingis Ĉinion kaj tie,

en la urbo Chánbalík (Ĥanbalik), sub protekto de la regantohano, li restis tie ĉirkaŭ 3 jarojn kaj disvastigadis kristanisman.

Lian mision, aventurojn kaj impresojn skribe notis iu franciskana frato, do danke al tio la afero estas konata jam de 700 jaroj. Odoriko estas omaĝe rememorigata en sia naskiĝregiono en Pondenone, en Udine (nun Italio)... Kiel la afero koncernas nian landon? Lia patro ja estis soldulo en la armeo de la ĉeĥa reĝo Přemysl Otakar II (Premislo Otakaro la Dua) – do ni supozas, ke Odoriko estis ĉeĥdevena – Oldřich. Nuntempe eldoniĝis riĉenhava libro pri Odoriko (kies aŭtoro estas unu el la ĉefaj organizantoj de la tie ĉi priskribita afero: Vladimír Liščák). La organizantoj envicigis Esperanton en la eventon pro sia granda simpatio al la Lingvo, kiu same strebas ligi homojn de malproksimaj lokoj.

Ni ĉeestis sufiĉe multnombro kaj ankaŭ eniris la programon per niaj informoj pri Esperanto, pri la Klubo de esperantistoj en Prago, pri la eminenta esperantisto, doktoro Stanislav Schulhof el Pardubice. Pavol Kaščák prezentis sian, en Ĉinio verkitan (kaj premiitan), filmon „Amo kaj teo“.

La parola vorto estis alternigita per muzikaĵoj, kantoj kaj instrumenta muziko.

Eksonis eĉ la Esperanta himno, kiun la ĉeestantaj esperantistoj kantis starante. Vere emocia momento!

La ĉeforganizanto de la festo, sinjoro Jiří Altior, surloke anoncis kaj publikigis la ekziston de



Instituto por Renaskiĝo de Kultura Heredaĵo. Li proklamis,

ke la Instituto konsideras Esperanton, kiel uzindan kaj valoran PERANTON por siaj vizioj kaj celoj. Tia proklamo de flanke de neesperantistoj havas pezon... Tial ni estis invititaj kunlabori. Interkompreniĝo kun historia testamento kaj ankoraŭ la aliaj aspektoj.

La kunveno daŭris de la 15-a posttagmeze ĝis la 22-a nokte. Inkluzive la solenan meson en la Preĝejo, kiun celebris la Fratoj-franciskanoj, en kies monaĥej-spacoj ni estis gastoj. Ni spektis la projekcion de la filmo „Když zařve lev“ (Se hurlos la Leono), kiu baziĝas je fiktiva dialogo inter Odoriko kaj la reĝo Premislo Otakaro la Dua.

La organizantoj preparis feston, kiu meritas dankon.

Margit Turková

“GLORIA ARTIS”: POLA MINISTERIA MEDALO POR ROMAN DOBRZYŃSKI

Danke al iniciato de Pola Esperanto-Asocio (PEA), en la 10-a de novembro 2022 la ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo de Pollando, Prof. Hab. D-ro Piotr Gliński, decidis aljuĝi al la fama pola esperantisto Roman Dobrzyński gravan ministerian distingon: la bronzan medalon Merita por Kulturo “Gloria Artis”. En sia propono PEA emfazis la signifan kontribuon de Dobrzyński por popularigado de kulturo ĝenerale kaj liajn meritojn kiel prezidanto de PEA, kiam en 1987 li ĉeforganizis la plej grandan Universalan Kongreson en Varsovio; kaj kiel televida raportisto, pro kio li atestis gravajn historiajn eventojn kaj realigis ĉ. 300 dokument-filmojn.

Roman Dobrzyński naskiĝis en 1937 kaj esperantistiĝis en 1955. Li magistriĝis pri juro kaj poste pri ĵurnalismo per tezo pri la

Esperanta gazetaro. Kiel studento li aktivis en la Esperanto-movado per verkado, redaktado kaj instruado, kaj kiel estrarano de Pola Esperanto-Junularo. Li estis vicprezidanto de TEJO (1966-68) kaj redaktoro de *Kontakto* (1968-70). De 1973 ĝis 2003 li laboris kiel ĵurnalisto de Pola Televido kaj en tiu rolo multfoje traktis Esperanto-rilatajn temojn, farante ankaŭ filmojn pri Esperanto, ekz-e “Bona Espero” (1984). Jam en 1980 la Asocio de Polaj Ĵurnalistoj elektis lin la plej bona publicisto pri internaciaj aferoj.

En 1995 li cetere iniciatis la esperantigon de “Mazi en Gondolando”, de BBC. Li estas membro de UEA ekde 1961 kaj estis komitatano kaj vicprezidanto de UEA (! 1989-92). Li kontribuis al la establo de Fondumo Zamenhof kaj estis ĝia unua prezidanto. En 2003 aperis lia libro *La Zamenhof-strato*, pri interparoloj kun D-ro L. C. Zaleski-Zamenhof, sekve tradukita en multajn lingvojn. En 2005 li estis elektita Honora Membro de UEA kaj ricevis la unuan premion de la Fondaĵo Grabowski pro siaj esperantlingvaj filmoj kaj la verko *La Zamenhof-strato*.

Dobrzyński estas elstara ĵurnalisto kaj poligloto, ĝis nun – 85-jaraĝa – tre aktiva sur diversaj kampoj rilataj al Esperanto, internacia kunlaborado kaj ĵurnalismo. En interkonsento kun Bjalistoka Esperanto-Societo estis decidite, ke taŭga okazo por enmanigi la medalon al Dobrzyński estos la [23-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj](#). La solenaĵo okazis la 10-an de decembro 2022 en Bjalistoko kaj la medalon transdonis la vojevodo (provincestro) de Podlaĥia Provinco, S-ro Bohdan Paszkowski. UEA gratulas al Dobrzyński pro la meritoplena honorigo.

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

100-a Germana Esperanto-Kongreso 2023

La GEK ĉi-jare okazos en Braunschweig (26.5. - 29.5.2023) kaj havos la ĝeneralan temon "Amikoj tutmonde". Ĝi estas la 100-a, do jubilea kongreso - ankaŭ la 1-a okazis en Braunschweig en 1906.

Ĉiujn (ĝis nun konatajn) detalojn pri la kongreso vi trovos en la kongresa retpaĝaro: <https://www.esperanto.de/eo/gek2023>.

Ĉu vi povas proponi kontribuon - prelegon, prezentaĵon, diskuton, ... al la programo de la kongreso? Interesaj estas ankaŭ kulturaj programeroj - koncertoj, teatro, ...

Bedaŭrinde la buĝeto ne permesas pagi honorariojn kaj vojaĝkostojn al niaj kontribuantoj. Kiel bazon ni ofertas rabaton al la partoprenkostoj de 100 € por unufoja programkontribuo, por pli ampleksaj kontribuoj laŭ interkonsento pli.

El la retroŝto de Franz Kruse

[<gek@esperanto.de>](mailto:gek@esperanto.de)

El la blogo de Paiva Netto el Brazilo

Per sia artikolo “Kristnasko estas plivastiĝo de la Ekumena Frateco”, la verkisto Paiva Netto prezentas ĉi tiun instruon: “Se, kiel mondcivitanoj, en tempo de tutmondigo, ni sukcesos fine esti pli humilaj kaj grandanimaj, tiam ni sukcesos elpreni el la Kristnasko ĝian grandan instruon por ĉiu tago. Jen restas la granda instruo: estas necese, ke la Kristnasko de nia Dia Majstro multobliĝu kiel plivastiĝo de Frateco, ĉar ne eblas postvivado sen ĝi.”

Per lia artikolo “Novjaro kaj memestimo”, la aŭtoro alportas mesaĝon de Espero kaj kuraĝigo al koroj: “Ĉiu reaperanta novjaro renovigas esperon pri tagoj pli feliĉaj. Oni faras antaŭvidaĵojn, oni starigas celojn. Tamen, nenio ŝanĝiĝos, se ni ne scios, ke malantaŭ idearo pri ia pli bona mondo estas nemalhaveble unualoke, ke oni havu internan sintenon, spirite ekumenan, por plenumi bonajn agojn. Antaŭ kelkaj jardekoj oni demandis min pri espero rilate alvenon de nova jaro, kaj mi respondis: Nova Jaro! Bona Jaro? Dependas de ni mem!

La Eŭropa Parlamento pri multlingvismo

La klopodoj de la eŭropaj esperantistoj, kiuj faris proponojn kaj subtenis tiujn proponojn pri Esperanto la pasintan jaron en la tiel nomata Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo, ne estis vanaj. La Komitato pri Kulturo kaj Edukado de la Eŭropa Parlamento (CULT) ĵus publikigis gravan studon kun la titolo "La aliro al multlingvismo en la komunika politiko de Eŭropa Unio" (la aŭtoroj estas D-ro Michele Gazzola kaj 5 kolegoj), kiu citas Esperanton kiel logikan, vivantan lingvon.

La studo taksas la lingvan politikon de Eŭropa Unio surbaze de profunda jura analizo kaj la uzon de la oficialaj lingvoj en 1,5 milionoj da retpaĝoj de 13 EU-instituciaj retejoj, kaj la lingvokapablojn de eŭropaj plenkreskaj loĝantoj. La studo estas elŝutebla ĉe:

[http://www.europarl.europa.eu/RegData/etudes/STUD/2022/699648/IPOL_STU\(2022\)699648_EN.pdf](http://www.europarl.europa.eu/RegData/etudes/STUD/2022/699648/IPOL_STU(2022)699648_EN.pdf)

Ne-oficialaj tradukoj en ĉiuj eŭropaj lingvoj estas haveblaj ĉi tie:

<http://www.europokune.eu/index.php?article9/multlingvismo-de-europa-unio-en-sia-komunikada-politiko>

En la paĝo 76-a la raporto konstatas, ke "Ne ekzistas komuna lingvo en EU parolata je tre bona nivelo (t.e. denaska aŭ scipova) de la plimulto de la loĝantaro" kaj en la paĝoj 84-85 estas emfazata la graveco de la lernado de duaj lingvoj, kaj estas citita kiel ekzemplo la programo "Multlingva Akcelilo", la plej voĉdonita inter la proponoj en la eduka sektoro en la Cifereca Plurlingva Platformo de la Konferenco pri la estonteco de Eŭropo en 2022. La programo Plurlingva Akcelilo montris signifan kaj rapidan plibonigon de la lingvokapabloj de 8- ĝis 9-jaraj lernejoj, kiuj akiris tiujn kapablojn unue lernante zorge elektitan, limigitan kvanton de vivanta, logika lingvo kiel Esperanto.

La Komisiono de UEA por Agado en Eŭropo kaj Eŭropa Esperanto-Unio dankas ĉiujn eŭropajn esperantistojn, kiuj subtenis niajn proponojn por Esperanto kaj aparte doktoron Michele Gazzola, kiu partoprenis la redaktadon de la nun aperigita raporto kaj invitas ĉiujn partopreni la estontan kampanjon por utiligi tiun mencion en nia informa laboro.

El la Komunikoj de UEA

Ekskurso al la Himalajo

Nepala Esperanto-Asocio organizas la 5-an specialan ekskurson al Himalajo de la 26.2.2023 ĝis la 8.3.2023. La aĝo de la partoprenantoj ne estas limigita, povas partopreni eĉ la malpli kapablaj, kiuj efektivigos parton de la vojaĝo per buso. Nepalaj esperantistoj interesiĝas pri granda partopreno por subteni la E-movadon en sia lando. Al la aranĝo invitas la eksprezidanto de UEA Renato Corsetti.

Esperanta kastelo Greziljono en 2023!

2023-mar-04/05 Multaktiveca semajnfino : akvarelo, natur-arto

→ 2023-mar-25/26 Multaktiveca semajnfino : Hatha-jogo, akvarelo →

2023-apr-14/23 12a [PRINTEMPaS](#), intensivaj kursoj kun *Marion Quenut, Paweł Fischer-Kotowski, SZILVA Szabolcs, Przemek Wierzbowski*

2023-apr-24/30 [Ĥora \(korusa\) renkonto](#) kun *Bernard Bigonnet, Anne Le Bot*

2023-apr-24/30 [BEMI-Semajno](#) de esperantlingvaj biciklistoj kun *Olivier Buisson* <gresillon@gmail.com

Trista anonco el la redakcio:

Sinjorino Joël, skribis al ni, ke mortis la franca ano de AEH, ŝia kara edzo, sinjoro Raymonde Coquisart jam la 22-an de decembro 2022.

Honoron al lia memoro.



INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,

530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.